

Dinamikigo de la antaŭa procezo al la renkontiĝo cele al la starigo de la Bloko por la Integra Revolucio

Tiu dokumento priskribas la proponon de dinamikigo de la antaŭa procezo al la starigo de la Bloko por la Integra Revolucio. Ĝi samtempe celas respondi al la plimulto de la priatentitaj duboj. Ĝi adresiĝas al ĉiuj personoj kiuj legis la [alvokon](#)¹ kaj kiuj interesiĝas al partopreno en la procezo.

1. La procezo

Kiel priskribite en la alvoko, ni realigos antaŭ la renkontiĝo procezon de interkono kaj debato. La celo estas ekkoni nin, ekstarigi komunan spacon je loka nivelo, debati la bazojn kaj prepari la renkontiĝon. Tiu procezo daŭros la tutan bezonatan tempon. Ni proponas realigi ĝin baze de lokaj nodoj, de la partopreno de personoj kaj kolektivoj kaj de la dinamikigo de la promocia grupo.

2. La promocia grupo

Funkcioj de la promocia grupo ĝis la renkontiĝo:

- Diskonigi la alvokon.
- Kuraĝigi kaj provizi la ilojn por la lokaj nodoj.
- Dinamikigi la debatan procezon.
- Administri la retejon <http://integrarevolucio.net>, la asociatajn retmesaĝojn kaj la twitter [@integrevolucio](#).
- Dinamikigi la diversajn proponojn de eblaj datoj kaj lokoj por konkretigi la renkontiĝon.

Kiu povas partopreni al la promocia grupo

Ni pensas ke por simpligi la aferon kaj por esti pli funkciigaj necesas ke la promocia grupo estu formata de personoj kiuj povas fizike renkontiĝi. Tiumomente ni plenumas tiun taskon ekde Barcelono. Ĉiukaze, se vi interesiĝas pri kunlaboro kun la promocio aŭ se vi havas ian sugeston, ne hezitu skribi al ni.

La promocia grupo estas mafermata al ĉiuj personoj kiuj samopinias kun la bazoj de la alvoko.

3. La lokaj nodoj

Loka nodo estas grupo de personoj el la sama regiono kiuj organiziĝas por krei lokan spacon ĉirkaŭ la ideoj de la Integra Revolucio kaj por progresi ĝis la kreado de la Bloko. Ni

1 <http://integrarevolucio.net/>

proponas ke la partopreno en la lokaj nodoj estu je persona titolo kaj ni esperas ke la nodoj kaj la kolektivoj estu en kontakto.

Propono de funkcioj de la lokaj nodoj (unu aŭ kelkaj el tiuj realigotaj)

- Diskonigi la alvokon je loka kaj regiona nivelo.
- Realigi fizikan renkontiĝon pri elstarigo de nodo.
- Kontakti kun la lokaj kolektivoj kaj projektoj kiuj proksimiĝas al la ideoj de la Integra Revolucio.
- Dinamikigi procezojn de debato pri la ideoj de la Integra Revolucio je loka nivelo.
- Ekkrei tiun komunan kadron ĉirkaŭ la ideoj de la Integra Revolucio en sia teritorio.
- Provizi aliron al la geuzantoj de la nodo en la virtuala socia reto (vidu la sekvantajn paragrafojn).

Kiel krei nodon

Por krei nodon necesas:

- Identigi kaj kontakti kun la lokaj kaj regionaj kolektivoj kaj projektoj kiuj proksimiĝas al la bazoj de la Integra Revolucio.
- Kunvoki renkontiĝon kun la interesataj kolektivoj kaj personoj.
- Konfirmi que estas sufiĉaj personaj pretaj sekurigi la procezon (sugestita minimumo: 4 personoj).
- Informi la promocian grupon por ke ĝi provizu vin per la iloj.

4. La lingvo

- Ni provas nun traduki la alvokon al maksimumo da eblaj lingvoj por ke la propono kaj la ideoj enhavataj en ĝi disvastiĝu tra la tuta mondo.

- La lingvaj kapabloj de la promocia grupo estas limigitaj. Ni nur povas devontigi nin pluigi komunikadon kaj traduki la dinamikigon de la procezo antaŭ la renkontiĝo al tri helpaj lingvoj: la esperanta, la angla kaj la hispana.

- Ni elektas esperanton kiel neutralan lingvon. Pro ĝia malmulta uzo, ni pensas ke estas nemalhaveble uzi aliajn lingvojn. Pro ilia granda disvastiĝo kaj pro la kapabloj de la promocia grupo, ni elektas la hispanan kaj la anglan.

Pri la spaco de virtuala debato

- Por disigi informadon inter la debatoj en la diversaj lingvoj, ni proponas fari regulajn rezumojn.

- Se bezonate ni povas krei debatajn spacojn en novaj helpaj lingvoj. La minimumaj kondiĉoj por krei novan lingvon en la debata spaco estas:

- Iu loka nodo devas administri ĝin.
- Traduki la proponojn de dinamikigo de la promocio grupo.
- Fari la zintezojn de la debatoj minimume je la indikataj datoj (la 30an de junio kaj poste ĉiuj 3-6 monatoj).
- Doni aliron al la uzantoj kiuj petas ĝin kaj kiuj partoprenas al iu loka grupo.

5. Debataj spacoj

La celo estas elstarigi debatojn ĉirkaŭ la proponitaj ideoj inter la personoj kaj kolektivoj proksimaj al tiuj ideoj. La celo estas progresi en la debatoj de la ideoj, ne pridiskuti la komojn kaj la punktojn, kaj paroli pri la fundamentaj ideoj.

Debatokampoj:

Ni proponas la sekvantajn debatokampojn:

1. Funkciado de la bloko.
2. Celoj de la bloko.
3. Ideologiaj bazoj:
 - Plijustaj homaj rilatoj bazataj sur la libereco.
 - Memorganizo kaj popolaj decidpovaj asembleoj.
 - Tio komuna, tio publika.
 - Nova ekonomio bazata sur la kooperado kaj la rilatoj de proksimeco.
 - Kooperi kun la vivo kaj la naturo.
 - Kiel ni povas fari tion
4. Kiam, kie kaj kiel realigi la renkontiĝon

Se oni konsideras ke certaj aliaj temoj devas aldoniĝi al tiuj temgrupoj, eblas krei novajn temojn.

Spaco de virtuala renkontiĝo

La grupo IntegraRevolucio estas kreita en la socia reto n-1². Ni celas ke la alportoj al la debato estu maturitaj kaj antaŭ-prilaboritaj proponoj por tiel eviti malkoncizajn debatojn kiuj devojigas de la ĉefa afero: konstrui konkretigante kaj definante Bazojn por la Integra Revolucio. Tial ni proponas la sekvantan funkciadon:

- Oni aliras al la grupo tra invitilo.
- Estas du grupoj ene de la grupo IntegraRevolucio:
 - 1) *Teritoria organizado: Nodoj*
Ene de tiu grupo estas unu grupo por ĉiu nodo
 - 2) *Debataj spacoj (per lingvoj)*

² La grupa hiperligilo estas: https://n-1.cc/g/integra_revolucio. Se vi havas dubojn pri la uzo de la socia reto, vi povas serĉi lernilojn en la reto aŭ skribi al ni.

Ene de tiu grupo estos unu grupo por ĉiu helpa lingvo.

- La unua paŝo estas partopreno en iu nodo ene de “Territoria Organizado”. En la nodoj naskos la debatoj je loka nivelo. Kontakto kun la plej proksima nodo³. Por krei nodon, bonvolu kontakti kun la promocio grupo⁴.
- Post membriĝi al iu virtuala nodo, vi povos aliri al la “debato spaco” de viaj preferataj helplingvoj, petante tion al la grupo.
- Por ebligi la informadan interŝanĝon inter la diversaj debatoj laŭ la lingvoj, kelkaj datoj estos fiksataj por ke la administrantoj de ĉiuj lingvoj rezumu la ĉefajn interkonsiliĝojn kaj alportojn en sia lingvo. Oni petas ke la administrado de ĉiu lingvo garantiu la tradukon al minimume unu el la tri sekvantaj lingvoj: la esperanta, la angla kaj/aŭ la hispana (kaj prefereble al la 3). La administrantoj de aliaj lingvoj povas traduki la sintezojn al siaj propraj lingvoj.
- Ni fiksas la 30an de junio de 2013 kiel unuan momenton por kunigi tiun informadon kaj aliaj datoj estos fiksataj laŭ la posta disvolviĝo.

Spacoj de fizika debato

- Ni proponas elstarigon de spacoj interkonsiliĝaj, de interŝanĝo de ideoj kaj spacoj de lernado (kiel grupoj de kolektiva studo-pripensoj) La lokaj nodoj povas krei tiujn grupojn cele al debato ĉirkaŭ la proponitaj aktoj kaj plifortigi kaj plilarĝigi spertojn je loka nivelo por ekkrei spacon ĉirkaŭ la Integra Revolucio je loka nivelo.
- Ni rekomendas transigi la konkludojn aŭ la interkonsiliĝojn el la loka spaco al la virtuala spaco por disigi ĝin kun la aliaj personoj engaĝitaj en la procezo.

6. Kiel oni decidos la daton kaj la lokon de la renkontiĝo?

Estas multa laboro faronta antaŭ la renkontiĝo. Ni proponas ke en ĉiu momento de la komuna arigo, la lokaj nodoj vortigu sian senton pri la loko kaj la dato de la renkontiĝo. Kiam estos diversaj proponoj de lokoj kaj kiam multaj nodoj konsideras ke estas la momento realigi la renkontiĝon, ni malfermos debatforumon en la debatspacoj. Ni ankaŭ faros konsulton/pritakson inter la nodoj por decidi la lokon de la renkontiĝo.

³ La celo de tiu mapo estas faciligi la kontakton inter personoj el la sama teritorio kiuj ŝatas partopreni al la kreado de la bloko: <http://integrarevolucio.crowdmap.com>

⁴ info@integrarevolucio.net